

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Mars 1943

31 årg. Nr 3

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Svedlanda movado.

Kara samideano!

Je via afabla letero Espero volas unue danki kaj due provi iom rakonti el Svedlando. Vi sopiras kiel ni pri la paco kaj esperas — ankaŭ kiel ni — ke ni, "en paco vivantaj feliĉuloj eltenu".

Certe ni sentas nin kiel feliĉuloj kaj provas renkonti ĉiajn malfacilaĵojn kun trankvilo, sciante ke ili ĉiam estas multe pli mildaj ol tiuj, kiujn vi en militantaj landoj devas suferi.

Tamen ankaŭ por la movado en nia lando la longdaŭra milito estas tre granda malhelpo — tion ni ne povas nei — ĉar la interrilatoj kun eksterlando estas aŭ limigitaj aŭ tute baritaj, kaj pro tio la propagando por esperanto inter svedoj estas tre malfacila. Ni tamen laboras. Ni streĉas nian forton, ni ne volas pereji, ni volas ne nur elteni, ni volas kreski.

Ni havas multon, kio devus doni al ni konfidon kaj eblecojn.

Ni povas ĝoĝi, ke nia nacia organizo Sveda Esperanto-Federacio restas kiel centra forto, ke ĝi havas bonan rilaton kun la laborista movado, eĉ komunan institucion, Sveda Esperanto-Instituto, kiu lerte gvidas la studlaboron per kontrolado de lernolibroj kaj ekzamenoj. Pasintan jaron oni decidis fiksaĵn tagojn, unu printempan kaj unu aŭtunan, por la skriba ekzameno kaj dissendon de por la tuta lando komunaj taskoj por ĝi. Ĉi tiun jaron la instituto turnis sin al la malnovaj esperantistoj kun nova ideo, "Esperanta studservo", koresponda kurso je 15 leteroj, ĉiu sekvata post 15 tagoj de modelsolvo kun gramatikaj rimarkoj, laŭ kiuj la lernanto povas mem korekti sian propran solvon de la letero.

La ĉiutagan ekspedan laboron kun tiu kurso faras sub instituta gvido la vigla klubo en Malmö. En la Malmöa distrikto (Skania) oni multe okupas sin pri la grava hodiaŭa tasko, daŭrigaj kursoj por la malnovaj esperantistoj, kaj tiam oni ne nur pensas pri la venontaj pacaj tagoj sed ankaŭ pri tio ke la Svedlanda esperantokongreso dum 1943 estos aranĝita en Skanio, nome en Helsingborg. La preparan laboron en Helsingborg ni ne ĝenu per malkovro en tiu publika letero. Ni tamen povas flustri, ke oni preparas surprizojn.

Kvankam multaj esperantistoj forlasas siajn klubojn, la plimulto el la kluboj brave daŭrigas sian laboron ne hezitante aranĝi kursojn, eĉ se nur du aŭ tri anoncas sin.

Plej grave tamen estas, ke oni povas vivteni la interesecon de la malnovaj anoj kaj instrui al ili, ke nenia morgaŭa movado estas ebla, se ni ne eltenos la hodiaŭan tagon.

Pro tio la kluboj regule kunvenas, kaj kelkaj daŭre eldonas proprajn informfoliojn kiel antaŭe. Kluboj ligitaj kiel provinca distrikto eĉ disdonis kristfestan literaturan kajeron kun tre valora enhavo. Ĝi venis kiel respondo al la plendoj pro laŭtempe necesa malgrandigo de la laboro en la Sveda Eldona Societo. "La Espero", kiu estas inter la eldonaĵoj de tiu societo, montras per sia malgrandigita formato la malfacilaĵojn de la entrepreno. La kluboj helpas sin per propraj esperanto-folioj, ĉiam bonaj per lingva ekzercado en la kluboj, kaj kelkaj tre ŝatataj ankaŭ ekster la klubo. ekzemple "La Folio" de Malmöa klubo kaj "Nia Parolilo" de la Gotenburga klubo.

"Nia Parolilo" estas eldonita en kunlaboro kun ABF, t. e. la Laborista Kleriga Asocio, kaj donas ekzemplon de principo, laŭ kiu la kluboj ofte labcras: ili serĉas kunlaboron kun aliaj organizoj, kiuj turnas sin al la sama publiko kiel ni.

Sveda Esperanto-Federacio havas por siaj interrilatoj kun la gazetaro specialan organon nomitan "Pressinformation", kiu kolektas eltranĉojn kaj dissendas tiajn sciigojn pri esperanto, kiaj eble havas interesecon por la sveda gazetaro. Dum la nuna jaro oni ĝojas i. a. pri la apero en multaj gazetoj de interesplena biografio-artikolo pri d-ro Zamenhof, verkita de nia energia samideano Martin Fejde el Jönköping.

Kun la nomo Fejde ni alproksimiĝas al unu el la plej gravaj punktoj de nia sveda esperanto-movado. S-ro Fejde dum multaj jaroj laboris por konvinki nian federacion ke oni devas starigi salajritan postenon unue por gardi siajn okazajn venkojn en diversaj lokoj, due por ebligi neniam ĉesantan propagandon. En la jaro 1941 li sukcesis, kaj post la novjaro 1942 laboras por ni sindiko kiel vojaĝanta reprezentanto de la federacia estraro, kiel prelegisto kaj kiel kursgvidanto.

La por la afero kolektata mono ne estas tiel granda ke la sindiko povas ĝui sian vivon sen multe da laboro, sed la federacio havis la ŝancon trovi viron, kiu krom lerteco kaj intereso posedas la fizikan forton de juneco, necesan por streĉa laboro kaj la malfacilaĵoj dum ofta vojaĝado, precipe nuntempe. Lia nomo estas konata en multaj esperanto-rondoj, Tiberio Morariu, la rumano, kiu en 1933 hezite vojaĝis al Svedlando kun 3-monata kontrakto kiel instruisto, sed kiu restis unue tri jarojn, poste revenis kaj nun de longe estas sveda civitano.

Liaj raportoj donas bonan bildon de la nuna stato de nia sveda esperantovivo, kaj la observado de la gazetaro, por kiu la sindiko estas objekto, helpas nian propagandon. La prelegoj de la sindiko en kluboj kaj lernejoj estas unu el liaj plej gravaj taskoj flanke de la kursoj en

La grandfaro de Tove Strabulo.

FABELO.

De Stellan Engholm.

Tove Strabulo estis bienulo en la vilaĝo Frötuna. Kiam li iris tra la vilaĝo, li ĉiam ekzamenis la kampojn, brutojn kaj domojn de siaj najbaroj. Farante tion li tenis sian vizaĝon rekte antaŭen, kvazaŭ li nenion atentus ĉirkaŭ si. Anstataŭe li turnis la okulojn al la direktoj, kien li deziris rigardi. Li kredis, ke la homoj ne rimarkas lian scivolemon, kiam li tiel faras. Sed ili rimarkis lian manieron kaj pro ĝi donis al li la postnomon.

Lia bieno apartenis ne al la plej grandaj sed ankaŭ ne al la plej malgrandaj. Kaj ĝi havis bonan lokon, ŝirmita de la norda vento, deklivanta al sudo kaj suno.

Tove tamen asertis, ke lia bieno estas la plej malbona en la vilaĝo. En certa maniero li pravis, tamen ne en tiu senco, kiun li mem donis al siaj vortoj.

— Rigardu miajn kampojn! li diris al la najbaroj. Tie ĉi la gigantoj iam havis ludejon kaj ekzercis sin en ŝtonjetado, kaj ĉiam ili havis kiel celon ĝuste tiun terpecon, kie kuŝas mia bieno. Kaj nun devas mi, kompatinda homo, suferi pro tio! Krome fiksigis al iliaj ŝuoj kaj vestoj malbonaj semoj el ilia hejmloko, kaj ĉiujn semojn ili skuis de si en la loko, kie mia bieno estas. — Sed kial ĝuste mi ricevis ĉion en mia bieno? Ne ekzistas justo en la mondo!

La najbaroj diris:

— Vi stulte plendas. Ankaŭ niaj bienoj estis ludejo por la gigantoj, ankaŭ sur niajn kampojn ili ĵetis malbonajn semojn, kiuj fiksigis al iliaj krurvindoj kaj roboj, kiam ili survoje tien ĉi kuris tra siaj hejmaj kampoj. Sed ni forportis la ŝtonojn kaj radikeltiris la malbonajn plantojn. Faru vi same anstataŭ kuŝi sur la benko apud la forno aŭ iri sur la vojoj kaj strabi sur bonan rikolton sur kampoj de aliaj!

Sed tiam malico ekbrilis en la okuloj de Tove.

— Ŝtonkolektantoj kaj kurbodorsoj, kardoŝirantoj kaj fosratoj! Tio estas metio por vi sed ne por mi. Tiaj grandfaroj konvenas por servistoj kaj servistinoj.

*

Jen venis denove printempo. Akvo plaŭdis en la drenkanaloj, vaporo levis sin de la tero, alaŭdoj trilis super brunaj kampoj. La tutajn tagojn la bienuloj iradis malantaŭ plugilo kaj erpilo aŭ iris tien kaj reen sur la kampoj kun la semokorbo sur la ventro, dum ili solene lasis la flavajn grajnojn plui sur la nigran teron.

Sed en la bieno de Tove la neplugitaj kampoj estis flavaj de tusilagoj, kaj la multaj nekulturitaj terpecoj estis blankaj kiel pro neĝo, kiam ekfloris la pikilarbustoj.

Ju pli bela kaj riĉa fariĝis la printempo, des pli malhela fariĝis la mieno de Tove. Kiam venis tiu vespero, kiam oni bruligas ĝojofajrojn kaj salutas la someron per ludoj kaj kantoj, tiam Tove forlasis sian domon kaj iris en la arbaron.

lokoj, kie la intereso estas sufiĉe granda por permesi al la sindiko halti kaj resti kiel instruisto.

*

Ni rakontas, kiel vi vidas, kara fremdlanda amiko, pri niaj organizoj, kaj nun ni volas konfesi, ke ni faras tion parte fanfarone, parte hontante. Niaj organizoj estas bonaj, sed ĉu ni kuraĝas diri ke ankaŭ iliaj rezultoj estas bonaj?

Kiam ni venis ĉi tien en nia letero, ni haltas, kaj vi certe komprenas, kial ni en tia maniero publike respondas al via letero.

Nia opinio estas, ke ni havas sufiĉe multajn kaj bonajn rimedojn por fari bonan esperantolaboron, kaj tion ni ne nur volas rakonti al vi, sed pri tio ni ankaŭ volas memori niajn svedajn samideanojn. Ĉu ili havas rajton pensi kaj diri, ke la tempoj estas tiel malbonaj por ĉia laboro, ke ili neniam aŭ preskaŭ neniam povas fari aŭ esperi? Ne, ne...

Nia plej alta deziro estas ke ni, kiam ni havos eblecon renkontiĝi, povu raportiti al vi, ke la svedoj eltrovis la eblecojn ĉe siaj institucioj kaj malavare subtenis ilin kaj diligente uzis — jes — uzis ilin.

Stockholm la 1an de marto 1943.

Esperplene via
Red.

Okaze li venis al la malnova ofera fonto en la kverkarbaro. Li haltis antaŭ ĝi kaj rigardis en la nigran akvon. Subite li elprenis kelkajn arĝentajn monerojn, kiujn li havis en sia poŝo kaj unu post la alia ĵetis ilin en la malhelan fonton.

— Mia forto estu granda kiel mia malamo! li sible flustris, kiam la blankaj moneroj plaŭde malaperis en la akvo.

Kaj subite li sentis sin mirakle ĝrande kaj forta, la sango fluis en liaj vejnoj kiel printempaj riveroj, kaj la muskoloj ŝvelis sub la haŭto kiel riveregoj dum inundo.

Kiam li levis la kapon, li vidis la arbaron kiel freŝverdan herbotapiŝon sub siaj piedoj. La vilaĝo kuŝis antaŭ li kiel piedolonga kaj piedolarĝa loko, kaj la domoj estis grandaj kiel pizoj.

Singarde li faris kelkajn paŝojn antaŭen por provi siajn piedojn. Poste li komencis per piedfrapoj frakasi la grandajn montojn ĉirkaŭ la valo, kaj el la rokoj li faris grandan barilon ĉe la suda flanko de la valo. Eĉ momenton li ne ripozis. Li klopdis kaj penadis kiel neniam antaŭe en sia vivo. Ŝvito fluis kiel riveroj sur liaj vangoj, kaj ĝi vaporigis kaj ŝvebis ĉirkaŭ li kiel nuboj.

Fine li havis barilon same altan kiel li mem. Tiam li komencis senti lacon kaj diris al si, ke eble lia laboro jam sufiĉas.

Sed kiam li rektigis la dorson por ripozi, li sentis, kiel lia granda forto malaperas, kaj kiel li kapturte rapide malgrandiĝas. Post momento li trovis sin antaŭ sia propra domo kaj li ne estis pli granda ol antaŭe. Sed la dorso kaj la brakoj doloris, kvazaŭ ili estus frakasitaj de la severa laboro.

Sed kiam li rigardis supren por ekzameni sian kreaĵon, li ektimis. Tute proksime al lia bieno levis sin ĉielaltaj, krutaj montoj. Ĉirkaŭ iliaj pintoj muĝis sovaĝa neĝoŝtormo, kaj sur la nudajn deklivojn falis pluvo, kvazaŭ giganto estus verŝinta el sia sitelo tutajn lagojn.

Tove Strabulo premis la ĉapelon sur la orelojn kaj kuris en sian domon tiel rapide, kiel liaj lacaj piedoj povis lin porti, kaj tie li kuŝigis sin en sian ordinaran lokon sur la fornobenko. Li aŭdis tondron brui kaj vidis fulmojn brili, kaj la akvo fluis kiel torentaj riveroj ekster la domo. Li tremis pro teruro kaj malvarmo, sed antaŭ la mateno li endormiĝis pro laco.

Kiam li vekigis kaj elŝovis sian kapon tra la pordo, li ne vidis eĉ manplendon da tero en sia propra bieno, ĉie estis nur nuda rokogrundo. Sur la kampoj de la najbaroj restis la pli granda parto de la tero, sed ĉio kreskanta estis frakasita de hajlo kaj pluvo kaj estis grandparte forportita de la akvo.

Sed la granda montokonstruaĵo estis for. Li frotis siajn okulojn, ne kredante ilian ateston, sed kiom ajn li gapis, li sukcesis trovi neniun postesignon de sia granda laboro. Kaj malgraŭ ĉio li ĝojis pro tio.

Li eliris kaj sur la vilaĝa strato li renkontis la najbarojn, kiuj ĉagrenitaj kaj kun larmoj en la okuloj rigardis siajn detruitajn kampojn.

— Kia fivetero ili diris. Neniu homo memoras ion similan. Malbona potenco volis detrui nin.

— Jes, jes, diris Tove kaj rigardis al la tero. Poste li turnis la okulojn tiel, ke li vidis sian propran bienon, ĝemis kaj aldonis:

— Kaj kiel kutime la sorto plej forte frapis min.

Stellan Engholm.

Stellan Engholms nya bok:

**Maljunulo migras
Vengo**

du kamparaj noveloj.

Pris kr. 1:50 + porto och oms.

Använd beställningskortet med detta nummer!

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 698, Stockholm 1

KOKIN-AKADEMIO.

Aktuala komedio.

De F. Szilágyi.
(Daŭrigo.)

Svante Andersson (fiere): Antaŭ tri monatoj, kvar horoj, dekdu minutoj kaj 30 sekundoj la estraro de la klubo faris historian decidon, ke la klubo uzos siajn interrilatojn ekster Eŭropo por faciligi la krizproblemojn de nia lando. Ni ĉiuj konas la gravecon de la ovproblemo. Ni ĉiuj scias, ke niaj kokinoj perdis sian moralon dum tiu ĉi terura milito. Ili ne havas plu la samajn kvalitojn, kiel en la belaj pacaj tempoj, kiam ili senhezite metis siajn ovojn sur niajn tablojn. Nuntempe ili ne faras tion kaj se tamen jes, tiuj ovojn estas tro malgrandaj kaj malmultaj al la kupone nutrataj stomakoj. En la genia kapo de nia kasistino (*per poŝlampo li lumigas la kapon de la kasistino*) naskiĝis la genia ideo, ke ni interrilatiĝu kun la Verda Mgam-mgam-Klubo en Tanganjika kaj de tie ni petu specimenon de struto. La struto estas granda, terure granda birdo, kiu ... sed eble fraŭlino Fermula Okulia Liljeblad bonvolus ripeti antaŭ la publiko tiujn historiajn vortojn?

Prezidanto: Mi dankas vin, sinjoro Andersson.

Kasistino: Mi diris, ke ni havigu struton al la kokinaro de Grönköping. Por ke ili lernu, kiel oni povas kovi grandajn ovojn. Ke la ambicio pelu ilin antaŭen, fari ĉiam grandajn ovojn, ke ili lernu pli grandajn ovojn, plej grandajn ovojn.

Prezidanto: Ni skribis leteron al la Esperanto-Klubo en Tanganjika kaj mirakle al la internacia frateco tra milito kaj bombardado, antaŭ unu monato la Strutino, la instrutino, alvenis al Grönköping. Vi povas imagi la intereson de la publiko, la streĉoplenan atmosferon en Grönköping, kie la Esperantistoj tiel klare komprenis la plej aktualan, plej valoran voĉon de la tempoj.

Bovobleko.

Prezidanto: Sed permesu al mi, ke mi transdonu la vorton al nia sekretariino, fraŭlino Eulalia Amanda Etcetera Löfkvist, kiu en kolorriĉa artikolo pentris la momentojn de tiu grava tago.

La sekretariino (leviĝas): La 30-an de oktobro: la pala suno ŝetas mirantajn okulojn al la kutime idilie ripozanta Grönköping, kiu nun bolas, svarmas, krias kaj bojas. En la amaso de la homoj, infanoj, malpacigantaj hundoj, ni vidas lin, la plej grandan, la urbestron, kiu kun la aliaj alvenis por saluti la grandan savonton de la ovkomerco kaj krizmastrumado, la Struton. La Strutino, ĉi indan reprezentanton de la virina sekso, kiu instruos al niaj kokinoj teorie kaj praktike, per kompreneblaj ekzemploj, kiel oni povas kovi grandajn ovojn. Belega tago! La homamaso kelkloke tumultiĝas kaj okazas bedaŭrindaj akcidentoj. La edzino de la buĉisto tretas sur la voston de Nero, la konata kaj ŝatata hundo de bankdirektoro Eliason, kiu de sia flanko prenas senkuponan viandopecon el la ne tute kriza figuro de la menciita sinjorino. La sinjorino donas du vangfrapojn al la filo de la bankdirektoro, kiu ne tute senplezure rigardis la bedaŭrindan okazaĵon. La kolero de la patro estas senlima, li iras kun koleraj paŝoj al la buĉist-edzino, kiu atendas, atendas ... Ho, kio estas ĉi tie? Renversiĝos la paco de la urbo? Sed ne! Venas la vagonaro kun sia valora ŝarĝo kaj ĉiu forgesas sian vundon, sian zorgon. Hundoj, homoj estas egalaj en la intereso. Ĉiu volas vidi la unuan struton de la lando, la pioniran struton de Grönköping, kiun sekvos la dua, tria, centa ... Ho, Grönköping, estu benataj la lingvo kaj la kapo de la kasistino (*lumigas ĝin per poŝlampo*), kiu alportis al ni tiun ĉi struton.

Sed nun, nun! Jen! La vagonaro! Mi vidas kirliĝan tumulton ĉirkaŭ granda kaĝo. Oni levas supran pordeton, la struto elŝovas sian gracion kapon. Ĉapeloj, manoj, etendiĝas al la ĉielo, mi puŝas min antaŭen kaj levas supren en ekstazo mian karan, hereditan sunombreton. Iam ĝi ŝirmis la kapon de mia praavino de la sunradioj. Sed kio? Kompatinda struto! Ĝi estis ege malsata. Ĝi glutis mian ombrelon, la ruĝan flagon de la staciestro, la kaskon de la fajrobrigadestro, kompatinda li preskaŭ sufokiĝis, ĝis oni fortranĉis la rimenon de la kasko, sed neniu pentis, neniu bedaŭris ion, ĉar ĉiu sciis, ke la oferoj donos sian frukton kaj kokinoj gravediĝos kaj naskiĝos, koviĝos strut-ovoj dank' al la instruo de la strutino.

Prezidanto: Ne daŭrigu fraŭlino Etcetera tiun ĉi rakonton, bedaŭrinde la tempo de nia disaŭdigo estas barita kaj

mi devas senigi la aŭskultantaron de tiu granda plezuro, kiun ĉiam signifas la multkolora kaj esprimriĉa lingvo de nia sekretario. Mi volas aldoni nur, ke intertempe la struto englutis, ankaŭ nian tutan kason, ne nur metafore, sed fakte, ĉar malbonŝance nia genia kasistino, kiu havis la kluban kason en sia valizeto, iom tro mire rigardis la struton, kiu senhezite englutis la valizeton kun la kluba aktivo, t. e. 18 kronoj kaj 60 oeroj. En tiu ĉi enhavo post granda peno ni revidis 3 kronojn kaj 60 oerojn. La pa-permono mistere malaperis poreterne.

Kaj nun Gesinjoroj, mi scias, ke la grava okazaĵo, pro kiu ni kolektiĝis, estas proksima. Ne nur la pritrakto de la perdo de la 18 kronoj sed ...

Kasistino: ... kaj 60 oeroj ...

Prezidanto: 18 kronoj kaj 60 oeroj, el kiuj ni tamen revidis 3 kronojn kaj 60 oerojn, jes, ne nur tio sed — ni volas doni la vorton al nia kasistino.

Kasistino: Aŭskultu! (*solene*): La struto kaj unu el niaj plej spertaj kokinoj sidas kune kaj proksimiĝas la tempo, kiu montros, ke ... jes, ili sidas unu apud la alia kaj baldaŭ ni vidos la ovon de la instrutino kaj la rezulton de sensacia eksperimento, la novan, reformitan kokinovon! Nun, nun plenumiĝos la gloro de Grönköping antaŭ ĉiuj eŭropaj urboj!

Komitatanoj (murmuras ekscitite).

Heroldo (enkuras kun malgranda kokinovo): Jen la ovo!

Prezidanto: Ĉu ... ĉu ... nur tion povis lerni nia ko-ko-kokino? Ĉu la instruo ne estis pli efika?

Heroldo: Ho jes! Sed ne la kokino lernis, kiel oni devas kovi grandajn ovojn, sed male, la struto lernis, kiel oni devas kovi malgrandajn ovojn. Kaj jen la nova strutovo.

La estraro (svenas kun korŝira krio. Kurteno.)

PIONIRO.

Rolf Nordenstreng estas unu el la plej fruaj pioniroj de Esperanto en Finnlando. Se iu dubas pri tio, mi povos montri al li manuskripton ankoraŭ restantan en mia posedo. Ĝi enhavas la vortareton de la plej unuaj lernolibroj de D-ro Esperanto. Sur la papero-kovrilo de la 10 grandaj paĝoj ni legas la jenon skribitan per la mano karakteriza de Zamenhof: "Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto. Folio N-o Vortaro Esperanto-Finna. Verkis Rolf Nordenstreng. Kansainvalis-Suomalainen Sanasto. Nurnbergo. Presejo de W. Tümmel. 1895." Tiu 17-jara studento do tradukis por la maistro la finnan vortareton. Ĝi tamen ne estis presita ĉe Tümmel, kaj post kelka tempo Zamenhof sendis ĝin kun aliaj manuskriptoj al mi en Upsala por preso pere de la Kapitalo de D-ro Zamenhof, kio tamen ne okazis, sendube pro manko de mono. Mi konservu ĝin, rekomendis al mi la D-ro; kaj pro tio ĝi restas ĉe mi ankoraŭ nun.

Se ni serĉas la nomon Rolf Nordenstreng en la Enciklopedio de Esperanto, ni trovas, ke la historiistoj skribintaj por ĝi pri la movado en Finnlando nenion scias pri li. Tamen, tio estas domaĝo, ĉar li apartenas al la historio de nia movado. Dum mia tempo de agado en la Upsala klubo Nordenstreng estis inter niaj plej viglaj korespondantoj. Kaj entrepreninte en 1899 mian unuan vojaĝon en eksterlando, mi vizitis lin en Helsingfors, havis kun li memorindan kunestadon, kaj li montris al mi la urbon. En 1900, tiam fil. magistro, li translokiĝis al Upsala, fariĝis fil. lic. tie, kaj dokumentis sin per pluraj verkaĵoj specialisto i. a. pri la islanda lingvo kaj la homaj raso, pri kiuj li ankaŭ verkis en 1937 libron en esperanto.

Homo temperamenta kaj originala kun propra opinio pri ĉiuj aferoj, eĉ pri esperanto, Rolf Nordenstreng estas naskita la 4/2 1878, do en la pasinta monato li pasis la 65-jarlimon. Kvankam iom post festum, ni uzas la okazon gratuli la malnovan kaj maljunan samideanon pro longdaŭra, diligenta agado en la servado de la scienco.

Paul Nylén.

RAKBLAD "ESPERANTO"

"TUTMONDA" — de völkända, hållbara rakbladen finnas ännu i förkrigs-kvalité och -pris.
per st. 0:20
10 st. 1:70
Med oms. och porto 2:—

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 698, Stockholm 1.

SEF Spalten.

FRAN FÖRBUNDSKASSÖREN.

SEF:s bokslut för 1942.

uppvisar en förlust av kr. 96:—. Att förlusten kunnat begränsas till detta relativt låga belopp ha vi helt och hållet våra medlemmars givmildhet att tacka för, därigenom att de så frikostigt med bidrag till lokalhyra m. m. och inte minst med sina "julklappar" hjälpt oss att klara av de nödvändigaste utgifterna. Det är emellertid inte otänkbart att vi hade kunnat undvika även denna förlust på 96:— kr., om alla klubbar hade sänt in sina avgifter i god tid. Vi kunna omöjligt vänta hur länge som helst på avgifterna, då ju böckerna måste avslutas i tid för deklarationen. Det är vår förhoppning att resultatet skall bli bättre med det nya system som införts i år. Den ekonomiska ställningen är kanske något bättre än vad som framgår av bokslutet, i det att värdet av den under året inköpta dupliceringsapparaten, vilken helt avskrivits, ju mer än väl täcker förlusten.

Ombudsmannafonden (postgiro 2012).

Sedan redovisningen i novembernumret 1942 har endast en ny teckning tillkommit, nämligen Helge Andrén, Lyckeboatan 22, Malmö, som tecknat 3:— kr. för tre år, alltså tillsammans 9:— kr. Förut har redovisats kr. 4.707:08, varför teckningen nu är uppe i kr. 4.716:08.

Det är emellertid att observera, att detta är tecknade belopp, varav en stor del ännu icke är förfallen till betalning. De hittills inbetalda bidragen äro nu förbrukade och vi ha till och med inte kunnat utbetala full subvention för de sist förflutna månaderna. Vi få därför uppmana alla bidragstecknare, som ännu restera med inbetalningen för 2:a verksamhetsåret, att med det snaraste insända utlovade belopp. Vi hoppas även att klubbarna skola göra allt vad de kunna för att skaffa nya teckningar med de teckningsblock vi för någon tid sedan tillställde dem.

En julklapp åt SEF.

Vi lämna här redovisning över julklapparna till SEF:	
David Sölvén, Stockholm	5:—
Bertil Åkerberg, Stockholm	3:—
Sven Möllestad, Lundevärv	2:—
K. J. Moberg, Ängby	4:—
A. Andersson, Järvsö	2:—
Paul Nylén, Huddinge	3:—
Teodor Julin, Stockholm	10:—
Ella Nilsson, Sölvesborg	2:—
Lisa Larsson, Stockholm	4:—
Sune Ahlm, Stockholm	2:—
Motala Esperanto-Klubb	3:—
S. Andersson, Smedjebacken	2:—
Ebba Andersson, Göteborg	2:—
Jan Strönne, Malmö	2:—
Linus Andrén, Lindesberg	2:—
G. Wolmer, Tungelsta	2:—
I. Svensson, Tibro	3:—
David Sölvén, Stockholm	5:—
Martin Eriksson, Stockholm	2:—
Sven Alexandersson, Stockholm	2:—
Tore Sjöblom, Stockholm	2:—
Helmi Josefsson, Stockholm	3:—
Elisabeth Olsson, Stockholm	5:—
Harry Törnskog, Stockholm	2:—
Eva Pettersson, Stockholm	2:—
Ester Eriksson, Stockholm	2:—
Naëmi Johannesson, Stockholm	2:—
Per Svensson, Huddinge	2:—
Alfhild Svedmark, Stockholm	2:—
Bjarne Beckman, Strängnäs	50:—
Arvid Karlsson, Göteborg	2:—
Sven Brogren, Örebro	2:—
Paul Isacson, Älgårås	2:—
Folke Nilsson, Aled	2:—
Emil Lundkvist, Luleå	2:50
E. V. Ahlin, Brovallen	2:50

Werner Hägglund, Stockholm	2:—
Albert Björnemo, Våmhus	3:—
Bernh. Lavén, Örebro	2:—
Agda Olsson, Göteborg	5:—
Erik Lundvall, Tuna-Hästberg	2:—
Malmö Esperanto-Förening	10:—
Örebro Esperanto-Societo	2:—
J. O. Nilsson, Hälsingborg	2:—
Thure Wendt, Hälsingborg	2:—
Einar Lemke, Hälsingborg	2:—
John Fogelberg, Hälsingborg	2:—
Fred. E. Fernström, Hälsingborg	2:—
Kumla Esperanto-Förening	2:—
Martin Fejde, Jönköping	10:—
Erik Malmkvist, Äppelviken	5:—
J. W. Öhlund, Sandslån	2:50
Karl Wästfelt, Stockholm	2:—
Karlskoga Esperanto-Förening	23:—
Bengt Joelsson, Köping	10:—
Birger Gerdman, Stockholm	2:—
Ingrid Selander, Stockholm	2:—
Wald. Linder, Stockholm	2:—
Alfred Eriksen, Stockholm	2:—
Stellan Engholm, Ludvika	1:—
Olga Engholm, Ludvika	1:—
Berta Evert, Stockholm	2:—

S:ma kr. 249:50

Under Stockholms Esperanto-Förenings julfest den 6 jan. företogs dragning på julklappskvittona, varvid nedanstående personer erhöles bokpris:

Bokpris nr 1 (50 jarojn kun Paul Nylén, bibliofiluppl.) tillföll Werner Hägglund, Stockholm (nr 41), nr 2 (Sveda Antologio, häftad) gick till Albert Björnemo, Våmhus (nr 48), nr 3 (Gösta Berling, häftad) vann Elisabeth Olsson, Stockholm (nr 27), nr 4 (Tra Sovaga Kamcatko, bunden) erhöles Malmö Esperanto-Förening (nr 47), både nr 5 och nr 6 gick till Teodor Julin (nr 9 o. 8), det var Hindo rigardas Svedlandon, häftad, och La homaj rasoj de la mondo, bunden, nr 7 slutligen (La konscienco riproças) tillföll Karlskoga Esperanto-Förening (nr 62).

Vi be att få gratulera vinnarna och passa på samma gång på att tacka alla givare på det hjärtligaste. Vårt varma tack även till Förlagsföreningen, som haft vänligheten skänka bokprisen. De vinnare som redan ägde den bok de vunnit ha genom tillmötesgående från Förlagsföreningen fått byta ut den mot någon annan bok i samma prisläge.

Birger Gerdman.

FÖRBUNDSSEKRETERAREN.

La novaj membrokartoj ĉie ricevis aprobon kaj la sistemo funkcias bonege. Se la grupo ensendas multajn kopiojn de membrokartoj samtempe, ĝi povas sendi kiel "Affärshandlingar" en nefermita koverto kun 20 öre afranko. En tia letero oni ankaŭ povas kunsendi raportfoliojn kaj kartojn.

*

Kontakto jam atingita kun la grupoj en Grästorp, Sala, Hudiksvall kaj Malmköping. En Sundbyberg oni intencas revivigi la esperantistan vivon.

*

SEF traktas kun la organizo "Hjälp krigets offer" pri la ebleco liveri studmaterialon de esperanto al militkaptitoj. Se ni atingos rezulton ni revenos al la afero.

S a l e x.

OMBUDSMANNEN.

Ombudsmannen deltog den 5/1 som en av föreläsarna vid Kumla Ungdomsråds föredragsserie: "Skolan och den fria folkbildningen". Samtidigt hölls utställning med esperantoavdelning ordnad av Esperantoklubben i Kumla.

Efter arbete hemma i Örebro fortsatte ombudsmannen sina resor. Den 15/1 och 16/1 hölls föredrag i Krylbo och Folkärna och resan fortsatte över Borlänge till Falun, där föredrag hölls 18/1 i Läroverket och Seminariet. Resan gick sedan, med uppehåll och föredrag i Rättvik till Våmhus, där magister Björnemo ordnade föredrag i sockenstugan. Ombudsmannen fick här träffa en f. d. elev från sina kurser i Warschau och lära känna den kurs för folkskoleelever, som hr Björnemo leder.

Den 21/1 höll hr Morariu föredrag i Orsa och deltog i ett esperantosammanträde. Resan gick sedan över Vi-karbyn och Rättvik (föredrag på båda platserna) åter till Falun, där 2 skolföredrag hölls. Efter uppehåll i Örebro deltog ombudsmannen i årsmöte med esp.-klubben i Krylbo 30/1 på resa till Sandviken, där 3 föredrag hölls 1—2/2. Efter föredrag och esp.-lektion i Åshammar besökte ombudsmannen Norberg (föredrag och provlektion) och fortsatte sedan till klubbmöte i Gävle 4/2 och föredrag i Bomhus, där hr Morariu bl. a. hade ett intressant sammanträffande med den mångspråkkunnige disponenten Boman. Resan gick sedan med föredrag i Storvik och Kungsgården till Sandviken, där ett nytt esp.-fält synes vara att söka bland de internationellt arbetande bågskyttarna.

Beträffande Kungsgården gör hr Morariu i sin dagbok bl. a. följande anteckning:

La sindiko protokoligas profundan dankon al altaĝa kaj altenergia samideanino Maria Andersson, Söderåsen, kaj ŝia gastama fratino pro modela organizo de sindika restado kun 3 prelegoj en 3 lernejoj, ĉiu postsekvita de provleciono esperanta."

Red. kan tillägga, att frk Andersson fullföljer provlektionerna med 3 kurser i de 3 skolorna.

Den 11—14/2 besöktes Söderhamn, Sundsvall och Bollnäs med barn-kurs i Söderhamn under ledning av magister Stridell. Den 15—18/2 ägnades Sundsvall och Härnösand, där klubbmöten hölls och ett antal föredrag. Den 19—21/2 besöktes Nordingrå, Östanö och Strömsborg, där Logen Havsörn, Östbygdens fredsförening och SGU voro värdar. Resan gick sedan över Kramfors till Långsele för föredrag och klubbmöte den 22/2 och vidare till Sollefteå, varefter resan norrut avbröts.

I Sundsvall mötte grosshandlare Lalander, som framlade vissa förslag om förberedelser för efterkrigspropaganda. Som ett glädjande resultat av förra besöket kan ombudsmannen anteckna en av frk Dahlström ledd ungdomskurs.

Efter föredrag i Hudiksvall 25/2 och Söderhamn 26/2 deltog ombudsmannen i esperantomöte i Gävle 26/2 och höll ett livligt uppskattat roande föredrag i Kommunala Flickskolan den 27/2.

Ombudsmannen, vilkens adress f. n. är Örebro, återtar den 10 mars sina kurser i Jönköping.

Nils Nordlund †

